

Unu jarcento de esperanto-instruado: IV
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND pri la temo unu jarcento de esperanto-instruado.

La **Fundamento de Esperanto** ĉesis ludi la rolon de lernolibro. Ĝi tamen daŭre influas la esperanto-didaktikon, estante "**Roko, ĉe kiu ĉies opinioj devas cedi aŭ rompiĝi**", kiel skribis André ALBAULT en sia **Ĝenerala enkonduka notico** al la naŭa eldono de 1963.

A.- Kiel ni diris en antaŭa prelego, la esperantistoj aliras la Fundamenton kun retenemo simila al tiu, kiun oni konstatas vidalvide de sankta libro kiel la Sankta Biblio aŭ la Nobla Korano. Ekzistas kolektiva premo de la esperanto-publiko kontraŭ ĉia kritika sinteno al tiu "**neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo**". Tio malfavoras esperantologiajn esplorojn koncerne la evoluon mem de esperanto.

Cl.- Ni donu ekzemplon de rekomendo de la Fundamento, kiu jam estis erariga en 1905. Ĝi koncernas la elparolon de la vokalo E.

A.- Oni nun scias en la franclingvaj medioj, ke la 6-an literon de la esperanta alfabeto oni ne prononcas kiel **é** en "café" kiel asertas André RIBOT en sia **Précis grammatical d'espéranto**, sed kiel **è** en la vorto "après", kiel prave indikas la vortaro "Dictionnaire de poche" de SAT-Amikaro. Atenta aŭskultado de radioprelegoj, de kasedoj kaj diskoj pravas, ke la **Fundamento de Esperanto** eraris, kiam ĝi indikis al la franclingvanoj, ke ili devas elparoli **é** la 6-an literon. Malgraŭ tio la ĵus aperinta lernolibro **Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur** de Edmond LUDWIG kaj Renée TRIOLLE, kiun eldonis **Heroldo de Esperanto** en 1986, asertas, ke tiu vokalo prononciĝas **toujours (ĉiam) é**.

Cl.- Tiuj aŭtoroj devis elekti inter la oboe al la **Fundamento** aŭ al la lingva realeco. Ili donis la preferon al la fideleco al la **Fundamento**, kies antaŭparolo diras: "**la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta**". La konsekvenco de tiu elekto blinde obei al la fundamento kondukas al fonetika misvojigo de la esperanto-lernantoj.

A.- Kiam en la perkorespinda kurso de Kultura Centro Esperantista ni konsilis prononci tiun vokalon **è**, ni ricevis viglajn kritikojn, kiuj ripoĉis al ni malfidelecon al la Fundamento. Tiuj recenzantoj ripetis al ni la fundamentan ordonon, ke "**Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon ! Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto**."

Cl.-La realeco volas, ke esperanto evoluis. Ĝia elparolo fiksiĝis. La 16 fundamentaj principoj nuanciĝis. Ĉiu kursverkisto scias, ke la rimarko, kiu diris, ke en esperanto "**la uzo de la artikolo samas al tiu de la franca kaj germana**." estas absurdaĵo, ĉar tiuj du lingvoj malsame uzas la difinan artikolon kaj esperanto ankoraŭ malsame, kaj ke en esperanto tiu uzo

evoluis. Ĉiu ankaŭ scias, ke la konsiloj de **PIV** kaj **PAG** ne plene sekviĝu, ĉar la lingvo akiras propran manieron utiligi la artikolon **la**. La devo de la instruistoj estas prezenti al siaj gelernantoj kiel eble plej kompletan analizon de la hodiaŭa uzo. Same estas por ĉiu lingvero. La ĝisnuna manko de tiuj analizoj malhelpas la superan instruadon atingi la dezirindan nivelon. Esperantologio kaj interlingvistiko havas vastan studkampon, de kiu dependas la efiko mem de la instruado de esperanto.

A.- Sojle al la dua jarcento de esperanto, ni miras pri la kvazaŭa tabua sinteno al la **Fundamento**, kaj bedaŭras la mankon de bazaj verkoj. Tamen ni konsciu, ke la bazaj verkoj, kiujn ni povas konsili, pravas, ke ekde la publikigo de la fundamentaj principoj ĝis nun la esperanto-instruado daŭre riĉiĝis je tamen sufiĉe fidindaj gvidlibroj. Esperanton praktikas pli malvasta publiko, ol ni emas imagi. Mi persone dubas, ke ni atingas la milionon da parolantoj. Kiom da etlingvoj kiel esperanto fierus, se ili posedus bazajn verkojn samnivelajn al la niaj. Ni tendencas kompari esperanton al vastskale uzataj lingvoj, kaj tiam ni sentas la mankojn. Tio eĉ ofte senkuraĝigas nin. Ni akiru pli ĝustan juĝkriterion, fierante pri ekzistantaj kaj tamen sopirante al ankoraŭ pli bonaj. Ni diras tion, por ke oni ne konsideru niajn kritikojn laŭ negativa sinteno. Ili celas indiki vojon.

Cl.- En tre kompleksa situacio ni troviĝas komence de la dua jarcento de esperanto. La **Fundamento** trudis ĝis nun eŭropo-centran vidon de nia lingvo. Terminoj kiel **verbo** karakterizas samtempe vortelementon kaj funkcion. Kial ne serĉi pli adekvatan terminon. La termino **akuzativo** estas same malhelpa, ĉar la finaĵo **N** ekzemple ne korespondas al la nocio mem de akuzativo en la plimulto de la hindeŭropaj lingvoj, kie la prepozicioj alvokas kazon, kiu plej ofte ne estas la nominativo. Observado de la eraroj de la lernantoj kondukis nin al serĉado de terminologio, kiu emancipigu nin el la grek-latina gramatika terminologio, kiun la plimulto de la plenkreskulaj okcidentanoj fakte ne asimilis kaj la neokcidentanoj malbone konas. Ni lasu ĝin al fakuloj.

A.- Se ni instruas la signifon de la vorto **kerno**, ni povas komprenigi, ke la vortoj finiĝantaj per **-os, -as, -is, -us, -u, -i** estas **kern-vortoj**. Observado malkovrigas, ke ĉirkaŭ la kernvortoj la aliaj vortoj formas satelitajn grupojn. La tuto, kiu dependas de kernvorto formas pensunuon. En ĉiu pensunuo ĝenerale troviĝas vortgrupo, kiun oni povas konsideri kiel la gvidanton de la pensunuo. La lernantoj bone komprenas la esprimon **mastro** aŭ **mastra vortgrupo** por karakterizi ĝin. Komparo kun veturilo montras, ke la mastro estas la ŝoforo, la kernvorto la motoro. La aliaj vortgrupoj estas kvazaŭ pasaĝeroj aŭ **gastoj**. Observado malkovrigas gast-kategoriojn, kiujn karakterizas ĉu la finaĵoj **N** aŭ **E**, ĉu antaŭ-vorteto kiel **JE, EN, KUN, PER**, ktp. Tiu tre konkreta kaj simpla terminaro tuj ebligas strukturŝanĝajn ekzercojn, kiujn la tradicia terminologio kaŝas. El tio verŝajne la manko de tiuj ekzercoj en preskaŭ ĉiuj lernolibroj.

Cl.- Alia maniero prezenti la esperanto-gramatikon ŝatas konservi la terminojn **subjekto** kaj **verbo**. Tiam en **pensunuo** oni serĉas unue la verbon kaj la subjekton. Ĉiuj aliaj vortgrupoj ricevas la nomon **nesubjekto** kaj ilin karakterizas la nesubjektaj markoj **N** aŭ **E** aŭ **prepozicioj**, kiujn kelkaj nomas **ligvortoj**.

A.- Ne estas nia celo detale raporti pri tiuj provoj emancipiĝi el la grek-latina gramatika nomenklaturaro. Ni nur volis atentigi vin pri tiu strebado pli neŭtrale koncepti la lingvo-instruadon.

Cl.- En venonta prelego ni raportos pri la paroligaj ekzercoj struktur-ŝanĝaj, kies manko ĝenerale karakterizas la esperanto-lernolibrojn. Kiel vi konstatos, tiuj ekzercoj estas ege produktivaj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*